Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 85, novembro-decembro 2026

Universala Esperanto-Asocio

Universala Esperanto-Asocio festis la Tagon de UN, 24 oktobron 2026, per alvoko al pli granda kompreno internacia

En sia mesaĝo markanta UN-Tagon 2026, Universala Esperanto-Asocio samtempe festis la atingojn de Unuiĝinaj Nacioj kaj substrekis la bezonon “preferi kolektivan bonfarton super strikta meminteresiĝo” en serĉado de internacia kompreniĝo. La plena mesaĝo, transdonita al la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN kaj disvastigita tra la mondo pere de la filioj de UEA, deklaris jene:



“La Tago de Unuiĝintaj Nacioj, la 24-a de oktobro, markas la daton en 1945 kiam fondiĝis Unuiĝintaj Nacioj, dum venadis al fino la Dua Mondmilito kaj la streĉa resaniĝa procedo estis komenciĝanta. La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj listigas la kvar celojn de la organizo:

1. Konservi la internaciajn pacon kaj sekurecon;
2. Evoluigi inter la nacioj amikajn rilatojn;
3. Realigi internacian kunlaboradon por solvi internaciajn problemojn;
4. Esti centro por harmoniigi la klopodojn de la nacioj por atingi tiujn komunajn celojn.

“Tiu spirito de kunlaborado estis kaj estas konstante kontestata sed daŭre pluvivas. Ĝi dependas de la kolektiva bona volo, de certa nivelo de reciproka konfido, de preteco aŭskulti kaj ne nur agi.

“En epoko kiam, pli ol iam antaŭe, ekzistas bezono preferi kolektivan bonfarton super strikta meminteresiĝo, kaj kiam kunparolado, kunaŭskultado kaj kuna agado estas konstante minacataj, nia Asocio (la Universala Esperanto-Asocio) restas fidela al la serĉado de internacia kompreniĝo esprimata en la Ĉarto de UN kaj la similaj idealoj enkorpigitaj en la Internacia Lingvo Esperanto.

“Parolantoj de Esperanto tra la tuta mondo gratulas Unuiĝintajn Naciojn je ĝia okdekunua jaro kaj alvokas ĝiajn membrajn ŝtatojn kune labori por la bono de ĉiuj kaj la bonfarto de la internacia komunumo.”

UEA partoprenis konferencon “Komunikado por pli bona mondo”

“Unuiĝintaj Nacioj: Komunikado por pli bona mondo” – tio estis la titolo de konferenco lastatempe organizita en la urbo Novjorko de fakuloj de la Universitato Columbia kaj de la Civita Universitato de Novjorko (CUNY). Inter 21 kaj 23 oktobro, centoj da fakuloj pri komunikado, da studentoj kaj da funkciuloj de Unuiĝintaj Nacioj alfluis la terenojn de la du universitatoj por vigla diskutado pri la eksteren etendiĝo de UN, inkluzive de novaj formoj de komunikado, novaj komunikaj strategioj, kaj novaj manieroj por atingi la multajn publikojn de UN. Citante fruan rezolucion de la Ĝenerala Asembleo (13 februaro 1946), laŭ kiu “*Unuiĝintaj Nacioj ne povas atingi siajn intencojn krom se la popoloj de la mondo estu plene informitaj pri ĝiaj celoj kaj aktivecoj,”* la organizantoj de la konferenco kunvenigis vastan gamon de fakuloj por alfronti la demandon de efika komunikado.

Melissa Fleming, Ĝenerala Subsekretario pri Tutmonda Komunikado ĉe UN, laŭdis la organizantojn de la konferenco kaj substrekis ties ununuran celon: “utiligi komunikilojn por konstrui pli bonan mondon kaj antaŭenigi solvojn al tutmondaj defioj.” La alta nivelo de interesiĝo pri la temo kaj la entuziasmo de la partoprenantoj rezultigis vervan debaton kaj originalajn ideojn.

Plejparte ellasita el la debato, tamen, estis emfazo je dudirekta komunikado, nome je aŭskultado kaj komprenado aldone al sendo de mesaĝoj de la centro al la periferio. Oni dediĉis malmultan atenton al lingva diverseco kaj la bezono komuniki en lingvoj kiujn la publiko povu kompreni kaj en kiu tiu publiko povu mem komunikadi.

Tiurilata escepto, tamen, estis referaĵo prezentita de la reprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio apud UN, Humphrey Tonkin kaj Francis M. Hult. Tiu referaĵo traktis la ideon de lingvo kiel homa rajto kaj la esencan gravecon de dudirekta komunikado. “Kvankam gravas, tamen ne sufiĉas, ke oni komuniku eksteren al la mondo: egale gravas aŭskulti la mesaĝojn kiuj venas responde, kaj sekve adaptiĝi,” Tonkin komentis. Li aldone demandis: “Ĉu ni pretas por tio?”

Kiel Ĝenerala Subsekretario Fleming atentigis, “Senkonsidere pri tio kion ni volas sanigi ĉi-monde, komunikado ŝlosilas.” La novjorka konferenco konsistigis gravan paŝon tiudirekten, sed oni devas dediĉi pli da atento al la dudirekta karaktero de komunikado kaj al la bezono aŭskulti, do ne nur paroli, la lingvojn de la mondo.

La titolo de la referaĵo de profesoroj Tonkin kaj Hult gestis tiudirekten: “Sekvado de lingva egaleco en, kaj preter, 2026.” La referaĵo emfazis la gravecon de lingvo kiel homa rajto

kaj la gravecon komunikiĝi trans lingvoj kaj konservi lingvan diversecon. La rajton aŭskulti nepre akompanu la rajton esti aŭskultata.

Tonkin sugestis, ke, se dua konferenco kunvokiĝos, la rolo de lingvoj kaj lingva elekto ricevu pli da emfazo. “Ni devas atingi la homojn tie kie ili estas,” li sugestis, “kaj tio ne nepre troviĝas en anglalingva bobelo – aŭ eĉ grandlingva bobelo.” Mallonge dirite: komunikado estas dudirekta vojo.

Esperanto-aranĝoj tra la mondo

Se oni volas aŭskulti parolatan Esperanton kaj ricevi klaran impreson de la Esperanto-movado, oni profitus el vizito al *eventaservo.org*, servo kiu liveras informojn pri estontaj aranĝoj en Esperanto, multaj el kiuj estas atingeblaj distance.

Kvankam ĝi provizas nur selekton de Esperanto-agadoj tra la mondo, la retejo liveras enirvojon al tutmonda komunumo de parolantoj. Por la dato 7 novembro, ekzemple, eventaservo.org listigas dek ok aranĝojn en tiu tago en Rusio, Madagaskaro, Francio, Svedio, Belgio, Usono, Kanado, Brazilo, Meksiko kaj aliloke.

Aldone al kursoj kaj prezentoj diverstemaj, iuj programoj traktas profesiajn fakojn, specialajn interesojn, flankokupojn kaj distraĵojn. Granda okazaĵo fine de novembro (26-29 nov.) estos la ĉiujara Virtuala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenos preskaŭ mil parolantoj de Esperanto el la tuta mondo, kun 24-hora programo. La ĉiujaraj Virtualaj Kongresoj lanĉiĝis dum la kovima krizo kaj tamen daŭras – aldone al la ĉiujara ĉeesta Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉi-jare okazis en Graz, Aŭstrio, kaj venontjare okazos en Melburno, Aŭstralio.

Oficejo por rilatoj kun UN: Universal Esperanto Association, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. www.esperantoporun.org